

SCIENCA REVUO

UDK 000/05/=089.2

Vol.23, n-ro 4/96/
20.9.1972.

Aperas sesfoje jare. Jarabono 55 steloj aŭ 4,50 us.dol. aŭ 75 din.

FILOLOGIA NUMERO 3

(kunredaktita far prof.S.Guĝev, Sofio,Bulgario)


EL LA ENHAVO

- A.D.Duliĉenko: E.A.Bokarev - nekrologo
R.Haupenthal: Esenco kaj celoj de interlingvistiko
A.Alabault: Translitera cirila alfabeto
W.A.V.Themaat: Fleksio, derivado kaj paradigma morfologio
S.Guĝev: Spuroj de antikvaj kulturoj en la bulgara folkloro

E. A. BOKAREV

(25.2.1904.- 11.3.1971.)

(A.D.DULIĈENKO, AŜHABAD, SOVETIO)



La monda interlingvistiko kaj la kaŭkaza lingvoscienco suferis grandan perdon, kiam la 11-an de marto 1971. en Moskvo subite mortis la fama soveta lingvisto prof:d-ro Evgenij Alekseeviĉ Bokarev.

Prof.d-ro E.A.Bokarev naskiĝis en la 1904.j. en la suda Rusio/en la regiono de Rostov-na-Donu/, en familio de vilaĝa instruisto. Post la finstudo de lernejo li eniris en la lingvistikan fakultaton de la Nord-Kaŭkaza ŝtata universitato /Rostov-na-Donu/. Post la universitata studo B. laboras iom da tempo en Norda Osetio, kaj baldaŭ fariĝas supera lektoro en la Dagestana universitato /Mahaĉkala/. De la jaro 1939. li estis scienca kunlaboranto en la Instituto de lingvo kaj de menso je la nomo de akad.N.J.Marr en Leningrad. De unuaj tagoj de la milito, malbridinta de la faŝista Germanujo, B.batalis en vicoj de la Soveta Armeo. Pro la heroeco kaj kuraĝo li plurfoje estis distingita per ordenoj kaj medaloj de la Soveta Unio.

Post fino de la milito B. reveturas Leningradon, kaj en la 1953.j. translokiĝas en Moskvon por labori en la Instituto de lingvoscienco de la Akademio de Sciencoj de USSR /AN SSSR/, kie ĝis sia morto li estis sektoron pri lingvoj de Kaŭkazo.

Al la soveta kaj monda scienco prof.d-ro E.A. Bokarev estas konata kiel serioza esploristo de kaŭkazaj lingvoj kaj de la interlingvistiko.

Pri lingvoj de Kaŭkazo B. komencis okupiĝi en la jaro 1932. Lia ĉefa scienca intereso estis direktita al la studo de dagestanaj lingvoj kaj antaŭ ĉio al la lingvoj de ceza /didoja/ grupo. En la j.1949. aperis la unua granda verko de B. "Kratkije svedenija o jazykaŝ Dagestana" /Mahaĉkala/. La problemoj de la kompar-historia studo de dagestanaj lingvoj kaj de rekonstruccio de la pradagestana lingvo /en tiuj ĉi sferoj B. estis eminenta specialisto/ estis prilaboritaj de li en la libro "Vvedenije v sravnitel'no-istoričeskoje izučenije dagestanskih jazykov" /Mahaĉkala, 1961./ kaj en la artikoloj: "O zadaĉaŝ sravnitel'no-istoričeskoje izučenija kavkaŝkih jazykov"/1954./, "Smyĉnogortannyje affrikaty pradagestanskogo jazyka /opyt rekonstrukcii/" /1958./. Tiaj gravaj gramatikaj problemoj de la dagestanaj lingvoj, kiel la problemo de kazo kaj kazaj signifoj, la esprimo de subjekt-objektaj rilatoj k.a., li esploris detale en diversaj artikoloj /v."Jazyk i myŝlenije", "Izvestija AN SSSR", "Voprosy jazykoznanija" k.a./. Kiel logika finfaro de la pli ol 20-jara esploro de cezaj /didojaj/ lingvoj de Dagestano estis la doktora disertacio de B., kiun li sukcese defendis en la Instituto de lingvoscienco de AN SSSR en la j.1955. Sur bazo de la disertacio B. publikigis en la 1959. la ampleksan monografion "Cezskije /didojskije/ jazyki Dagestana" /Moskva/ - unu el la plej signifaj verkoj pri la malmulte esploritaj lingvoj - ceza, ĥvarŝina, ginuĥa, beĝitina kaj gunziba.

Prof.d-ro E.A. Bokarev estis respondeca redaktoro de la 4-a volumo /"Iberijsko-kavkazskije jazyki", 1967./ en eldonita de AN SSSR multvoluma serio "Jazyki narodov SSSR". En la volumo estas publikigitaj liaj gramatikaj skizoj de cezaj lingvoj kaj ankaŭ enkondukaj artikoloj pri iber-kaŭkazaj lingvoj /kune kun G.A. Klimov/ kaj pri dagestanaj lingvoj.

La scienca kontribuo de prof.d-ro E.A. Bokarev en la soveta kaŭkaza lingvistiko estas mezurable pli alta, ĉar li - krom la sciencaj esploroj - praktike kontribuis por la prilaboro de multaj socilingvistikaj problemoj, ekz. en la kreitaĵo de skriboj kaj verkado de normigaj gramatikoj de la novaj literaturaj lingvoj de Dagestano.

+

+ +

Dua flanko de la scienca kaj socia agado de prof.d-ro E.A. Bokarev estis ligita kun la prilaboro de teoriaj kaj praktikaj fundamentoj de la problemo de internacia lingvo /IL/. Estas eble sen trograndigo diri, ke B. estis signifa specialisto en la monda postmilita interlingvistiko.

Laŭ la vortoj de Ljudmila Petrovna, la edzino de prof.d-ro Bokarev, li komencis okupiĝi pri Esperanto ekde sia 14-jara aĝo kaj dum la studentaj jaroj agadis aktive kaj instruis Esperanton en multaj rondoj. Dum 20-30-aj jaroj B. estis unu el aktivaj adeptoj de la ideo de IL kaj de la esperantista movado en nia lando. B. plurfoje partoprenis en la

kongresoj de UEA, en diversaj sciencaj konferencoj pri la internacia lingvo. Sed la sciencintereso de B. ne limiĝis nur al Esperanto; li bone scipovis ankaŭ aliajn IL-ojn, kiel Ido, Occidental /Interlingue/, Interlingua. Evgenij Alekseviĉ estis inter tiuj malmultnombraj adeptoj de IL, kiu ankoraŭ memoris kaj praktike scipovis Volapükon.

Prof.d-ro E.A. Bokarev, kiel unu el la plej bonaj reprezentantoj de la patrolanda lingvistiko, sukcese evoluigis kaj progresigis konsiderojn pri IL de niaj famaj lingvistoj, ekz. I.A. Boudouin de Courtenay, N.V. Juŝmanov, L.I. Ĵirkov k.a.

La sciencaj esploroj de prof.d-ro E.A. Bokarev en sfero de la interlingvistiko komenciĝas ekde la 20-aj jaroj, kiam en nia lando oni aspiradis kaj prilaboradis la vojojn de nova, marksisma, lingvoscienco. En la 1928.j. en "Izvestija CK SSSR" /Moskva/ aperas la unua interlingvistika verko de B. "Meŝdunarodnyj jazyk i nauka o jazyke", en kiu la problemon de IL li science pritraktas inter aliaj ĉefaj problemoj de la lingvistiko. Poste la revuo "Meŝdunarodnyj jazyk" /Moskva/ publikigas la polemikan verkon de B. "Jazykoznanije i marksizm" /1929./, kie li skizas la ĉefajn problemojn de evoluigo de la marksisma lingvistiko kaj difinas lokon de IL en ĝi. Esprimante sin kontraŭ la identigado de marksisma lingvistiko kaj jafetida teorio de akad.N.J. Marr, B. distingas ĉe tia teorio ĝian ĉefan tezon - pri la unusola tutmonda lingvo /"la historio de lingvo estas unueca glotogonia proceso, evoluiganta de multlingveco al unusola lingvo de la tuta homaro"/.

Jam en sia unua verko pri la internacia lingvo /1928./ B. starigis antaŭ la esperantologion kelkajn gravajn taskojn: neceseco ordigi la Esperantan vortaron, scienca studado de ĝia frazeologio kaj stilistiko. En la j. 1956. Prof.d-ro Bokarev /kune kun O.S. Aĥmanova/ publikigis sur paĝojn de la centra soveta lingvistika revuo "Voprosy jazykoznanija" sian brilan verkon "Meŝdunarodnyj vspomogatel'nyj jazyk kak lingvistiĉeskaja problema" /kiu poste plurfoje estis tradukita en kelkajn fremdajn lingvojn/. Difinigante la problemon de IL kiel unu el "ĉefaj problemoj de la ĝenerala lingvoscienco", la aŭtoroj speciale turnas la atenton sur nerajtigon de la identigado de helpa IL kaj unusola lingvo por la tuta homaro. La praktika uzado de IL-projektoj estas, laŭ opinio de la aŭtoroj, tre interesa kaj grava por la scienco "amasa lingvistika eksperimento, daŭriĝanta dum kelkaj jardekoj". En la artikolo pritraktiĝas multaj ĉefaj problemoj, rilatantaj al la difino de principoj de la kreado de ideala helpa IL: la principoj de neceso kaj de sufiĉo /ĉe la difino de sememoj/, la principo de selekto /ĉe la difino de leksemoj/; sur la materialo de la praktike uzantaj IL-projektoj /Esperanto, Ido, Occidental-Interlingue, Interlingua k.a./ la aŭtoroj donas siajn proponojn pri ideala decido de la problemoj de fonema konsisto, vortfarado kaj sintakso de IL.

En la jaro 1966. sub la redakto de B. kaj kun lia aktiva kunlaborado aperis en Moskvo la unua postmilita "Rusko-esperantskij slovar'", taksinta en interlingvistika periodaĵo kiel solida atingo de la esperanta leksikografio.

Pri la problemo de ebleco de per homa racio konstruita helpa IL / sed ne tutmonda lingvo/ B. skribis en la artikolo "Internacia lingvosituacio kaj eblecoj de raciigo" /1967./, aperinta en DDR en la revuo "der Esperantist". En la 1968. prof.d-ro E.A.Bokarev kune kun akad.A.Berg, prof.d-ro D.Armand, en la publikigita sur paĝoj de la centra soveta gazeto "Literaturnaja gazeta" /Moskva/ artikolo "Ĵ4 jazyka ... jeŝĉo odin" alvokis akcepti kiel "unusola helpa lingvo de scienco iun artefaritan lingvon".

Tamen B. estis ne nur teoriulo pri la IL, li aktive anigadis homojn al diversaj interlingvistikaj kaj esperantistaj organizaĵoj, kongresoj ktp. Tiel, ĉe la Instituto de lingvoscienco de AN SSSR, laŭ iniciato de B., estis fondita kaj sub lia gvido sukcese funkciis la sekcio de interlingvistiko. Dum kunsidoj de la sekcio oni diskutis science teoriajn esplorojn pri la interlingvistiko kaj ankaŭ detale taksis novajn IL-projektojn. B. estis multjara membro de la Akademio de Esperanto /Paris/; en sia lando li gvidis Komisionon pri internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj. Kiel eminenta interlingvisto de la nuntempo, li estis elektita kiel membro de la redakta komitato en nova internacia scienca revuo "La Monda Lingvo-Problemo" /Haag/.

Nemultaj scias ke prof.d-ro E.A.Bokarev estis posedanto de tre riĉa interlingvistika biblioteko, kiun li kompletigadis dum sia tuta vivo. En la biblioteko ekzistas la plimulto de la fundamentaj verkoj pri IL, multnombraj gramatikoj, vortaroj de malnovaj kaj plej novaj IL-projektoj, raraj eldonaĵoj en dekoj da artefaritaj lingvoj, multaj altvaloraj periodaĵoj en diversaj artefaritaj IL de la dua duono de la 19-a jarcento.

Pri la literaturo li volonte diskutis kun junaj interlingvistoj de nia lando, en kies memoro por ĉiam konserviĝos ne nur lia granda praktika scienca helpo, sed ankaŭ tre interesaj "interlingvistikaj vesperoj", kiujn Evgenij Alekseviĉ aranĝadis hejme.

Li postlasis multajn nefinitajn interlingvistikajn planojn. Kunlaborade kun la aŭtoro de ĉi tiuj linioj, B. projektis eldoni plenan bibliografion de IL-projektoj, aperintaj post la 1925. /nefiksitaj en libro de E. Drezen "Za vseobŝĉim jazykom", 1928./. Laŭ la sciencplano de la Instituto de lingvistiko de AN SSSR, prof.d-ro E.A.Bokarev komencis labori pri la fundamenta interlingvistika verko "Problema meĵdunarodnogo jazyka". Li mortis ĉe sia skribotablo, lastfoje redaktante sian "Esperanto-russkij slovar'".

La scienca kontribuo de prof.d-ro E.A.Bokarev en la monda lingvistiko estas tre alta. Liaj multnombraj teoriaj esploradoj konsistigis bazon de la nuntempa scienco pri IL. La interlingvistikajn ideojn de prof.d-ro E.A.Bokarev nepre evoluigos kaj efektive perfektigos liaj dankaj disĉiploj.